

Eŭropa Bulteno

Januaro 2013, Numero 123

NIAJ LANDAJ MOVADOJ LA FINNLANDA MOVADO

Esperanto venis al Finnlando, kiu tiutempe apartenis al Rusa Imperio, jam tuj post la ekesto de la lingvo. La unuaj gazetaraj artikoloj, kiuj referencis al la Unua libro, aperis jam en 1887 kaj unuaj finnlandanoj lernis Esperanton jam en 1887 kaj 1888.

Laŭ apero de gazetaraj artikoloj esperanto disvastiĝis aparte rapide ekde 1904. La unua finnlingva lernolibro aperis en 1902 kaj la dua en 1904. Pli frue finnoj lernis esperanton tra sved- aŭ germanlingvaj lernolibroj. La fondiĝo de esperanto-societoj komenciĝis kun la socia aktivado post 1905. Ankaŭ la blindula Esperanto-agado, kiu estis grava parto de finnlanda esperanto-agado, komenciĝis jam tiam. La unua Esperanto-societo en Helsinko estis fondita en 1905 kaj la Esperanto-Asocio de Finnlando (EAF) estis fondita en 1907, kiam komencis aperi ankaŭ la unua esperantlingva gazeto en Finnlando. Post la sendependiĝo de Finnlando en 1917 Esperanto komenciĝis vigle disvastiĝi en la lando. Dum unu jaro 1918-1919 estis venditaj tri mil lernolibroj de Esperanto. Esperanta Finnlando, plene en Esperanto, havis en 1920 preskaŭ 800 abonantojn en Finnlando. En 1922 okazis la 14-a Universala Kongreso en Helsinko, unu el unuaj internaciaj kongresoj en sendependa Finnlando. Tamen post la kongreso la splitiĝo al neŭtrala kaj laborista movado disigis la fortojn. Kiel la tria kolono funkciis Esperanto-Instituto de Finnlando, kies gvidanto Vilho Setälä restis ekster la konfliktoj kaj povis agi kun ŝtata subvencio. Ĝenerale la agado restis malpli aktiva ol antaŭ la kongreso en 1922. Finnlanda esperantisto, profesoro G.J. Ramstedt estis la unua ambasadoro de Finnlando en Japanio, kaj li profitis pro kontaktoj kun esperantistoj en Japanio kaj povis ankaŭ subteni esperantan agadon en Japanio.



Esperanta agado pli vigliĝis en 1930-aj jaroj kaj post la milito. La apero de esperanta traduko de Kalevala estis ebla en 1964 kun ŝtata subvencio. Unuiĝo en esperanto-movado okazis en 1960-aj jaroj, kiam la laborista movado forvelkis. Antaŭaj aktivuloj de laborista esperanto-movado plu agis en EAF. Vilho Setälä (1892-1985) estis aktiva esperanto-instruisto kaj disvastiganto de Esperanto kaj fondis en 1955 Fondumon Esperanto kies kapitalo ebligas ankaŭ nuntempe subtenadon de Esperanta agado. Setälä estis inter 1955 kaj 1965 ankaŭ prezidanto de Esperanto-Asocio de Finnlando.

Aktiva agado rezultis ankaŭ internaciajn kongresojn, tiujn de SAT en 1958 en Helsinko, de fervojistoj en Helsinko en 1960 kaj la pinto de aktiva agado estis la Universala kongreso en 1969 en Helsinko. Poste okazis ankaŭ du kongresoj de SAT en 1972 en Kuopio kaj en 1982 en Iisalmi, kvankam tiam la laborista Esperanto-asocio ne plu agadis. Fervojista kongreso okazis en 1979 en Turku kaj Internacia junulara kongreso en Rauma en 1980.

Esperanto ĝuis vastan popularecon en popolkleriga libertempa lernosistemo ĝis la 1980-aj jaroj, kiam aliaj lingvoj fariĝis pli popularaj. Ekzemple komence de 1970-aj jaroj Esperanto estis same multe studata kiel la itala aŭ la hispana kaj ankoraŭ en komenco de la 1980-aj jaroj Esperanto estis inter la 15 plej studataj lingvoj. La membronombro de EAF atingis sian pinton en 1984, kiam EAF kaj ĝiaj membro-organizoj havis entute 722 membrojn. Novaj membro-societoj fondiĝis, inter ili la junulara sekcio FEJO en 1977.

En 1980-aj jaroj EAF akiris sian propran oficejon en Helsinko, kiu helpis en organizo de agado. La unua oficejo estis en duone subtera kelo sed en 1997 kun helpo de testamenta donaco la asocio akiris novan, pli grandan oficejon. La asocio havas 10 membrasocietojn (el kiuj tri fakaj: instruista, blindula, junulara) en ĉefaj urboj kaj krome ekzistas neformalaj Esperanto-grupoj en preskaŭ same multe da urboj.



La forvelko komencis en 1990-aj jaroj, kiam la oficialaj kursoj fariĝis malpli oftaj kaj la membronombro komencis fali. Organizaj malfacilaĵoj kaŭzis eĉ la portempan malfondon de la asocia gazeto Esperanta Finnlando en 1987. La nova gazeto tamen komencis jam en 1989 kaj povis travivi ĝis nun la ŝanĝon de pluraj ĉefredaktoroj. La organizo de Universala Kongreso en 1995 en Tampere ne multe turnis la negativan evoluon. Kelkaj lokaj membrasocietoj estis malfonditaj, same kiel la fervojista Esperanto-societo. Okazis ankaŭ Kultura Esperanto-festivalo en Helsinko en 2000 kaj 2005.

La manko de organizitaj kursoj en oficiala libertempa lernosistemo estas problemo kiu limigas alvenon de novaj membroj, kvankam daŭre aperas aktivaj individuoj. En multaj urboj la kvanto de membroj fariĝis malgranda kaj la aĝiĝo de membroj kaŭzis naturan malkreskon de membraro. En Esperanto-societoj la agadon gvidas ofte grandparte samaj personoj kiel jam antaŭ 30 jaroj. La membronombro malkreskas preskaŭ ĉiujare kaj estis en 2011 nur iom pli ol 300. Post la Universala kongreso en Tampere en 1995 ankaŭ la Esperanto-societo de Tampere

povis akiri propran oficejon. Tamen la maljuniĝo kaj malkresko de la membraro kaŭzas daŭran minacon al la agado de esperantistoj.




Somera kurso, unue dum 30 jaroj (1968-1997) en somera universitato de Jyväskylä, poste en monaĥejo Valamo kaj ekde 2013 en popola instituto en Orivesi restis preskaŭ la sola regula Esperanto-kurso. Kursoj estas aranĝitaj de esperanto-kluboj, plejparte ekster la oficiala libertempa lernosistemo, kiu kaŭzas malfacilaĵojn en informado pri kursoj. La malapero de Esperanto-kursoj estas unu el la gravaj kialoj por malkresko de membraro. Informa agado funkcias relative bone, aparte okaze de naciaj aranĝoj, vintraj kaj aŭtunaj tagoj kiuj kutime okazos diversloke, ankaŭ en lokoj kie ne ekzistas esperantistoj.

Esperanto ĝenerale ĝuas pozitivan renomon en Finnlando, sed malmultaj emas eklerni ĝin. La nivelo de Esperanto-agado kaj de esperantistoj tamen kreskis, pri kio atestas ekzemple apero de novaj lernolibroj, esperanta rokgrupo Dolchamar kaj la aktivado de finnlandaj esperantistoj en internacia nivelo. Ankaŭ apero de libroj en (i.a. tradukoj el finnlanda literaturo) aŭ pri Esperanto estis dum lastaj jardekoj relative ofta.

Jukka Pietiläinen

RESUME PRI LA JARO DE TIBOR SEKELJ



EEU proklamis la jaron 2012 „La jaro de Tibor Sekelj“ pro la centjariĝo de tiu granda esperantisto. La jaro pasis kaj ĉi tie ni resumas la rezultojn. La celo de la Jaro estis eluzi la nomon de grava esperantisto kiu samtempe estis monda vojaĝanto kaj esploristo konata ekster la Movado por pere de agadoj dediĉitaj al li popularigi E-on, almenaŭ en la landoj kie li postlasis diversajn gravajn spurojn. Kaj ŝajnas al mi ke ni sukcesis, kvankam ne en grado kiun ofertis tiu ŝanco. Mi kredas ke la plej grava atingaĵo estis ellaboro de vere elstara wikipedia artikolo pri Tibor en Esperanto kiu en oktobro estis proklamira artikolo de la semajno kaj oni povas konsideri ĝin la fontartikolo por retradukoj al aliaj lingvoj pro ĝia amplekso kaj detaleco. Pri diversaj aliaj aktivecoj jen ĉi-sube nur la listo de okazintaĵoj.

Prelegoj kaj publikaj prezentoj:

1. 26.11. 2011 Rotterdam – UEA: Spomenka Ŝtimec
2. 11.11, 2011 Spiška Sobota, Slovaka asocio: Jan Vajs
3. 16.2.2012. Maribor: Z.Tišljár, S. Ŝtimec, M. Vetrìh (+ TV eldendo)
4. 22.2. Budapeŝto: HEA: Erszebet Szekely
5. 27.02. Berlino: Omaĝo: Wollenberg, Blanke
6. 3.03. Katmandu (Nepalo): Bharat Ghimire
7. 23.03. Zagreb: Omaĝo en urbodomo: Judita Rey + S. Ŝtimec
8. 18-20. 05.. Subotica, Serbio: Ronda tablo pri T.Sekelj en Urbodomo kun 20 prelegoj el 9 landoj – starigo de memortabulo sur la domo kie Tibor vivis, organizis Đorđe Dragojlović
9. En Majo Franca E-kongreso: prelego de A.Lagrange + filmo pri Tibor
10. En Berlino dum dan-pola-germana kongreso prelego de Wollenberg
11. 16.6. Kroata E-kongreso:Koprivnica: Z.Tišljár
12. Omaĝo al Sekelj en junio en Mendoza: Argentino
13. Julio: Hanojo UK, Vjetnamo: prelegis Judita Rey
14. Galivo EEU-kongreso - Irlando: prelegis Z.Tišljár
15. 15.9. Hraŝĉina (Kroatio) Renkontiĝo de verkistoj dediĉitaj al T.Sekelj: 4 prelegoj (E.Szekely, Z.Martinov, S.Ŝtimec, Z.Tišljár)
16. 26.09. en Subotica (Serbio) prezento de filmo de Milofanović/File „ Sur spuroj de TS“ (pri ekspedicio 2005)

17. 14. 10.. Prelego de Yu Jianchao , Pekino (Ĉinio)
18. 07.11. Elementa Lernejo Gustav Krklec (Zagreb): prelegis Ivan Špoljarec
19. Novembro en Mendoza (Argentino): prelego pri Sekelj dum la Argentina E-kongreso.
Prelegis Roberto Sartor
20. 26.11. Maribor (Slovenio): La Jaro de Tibor Sekelj – prelegis Zlatko Tišljar
21. 10.12. Banja Luka (Bosnio/Hercegovino) en Urba Biblioteko: Zlatko Tišljar
22. 14.12. Bratislavo (Slovakio): Zlatko Tišljar
23. 14-12- Varaždin (Kroatio): Spomenka Štimec
24. 19. 12. Zagrebo (Etnoggaria muzeo): Prelego: Spomenka Štimec

Novaj libroj kaj tradukoj:

1. Korea eldono de Kumeuaua
2. Tradukita Kumeuaua al la franca
3. Interkonsentitaj eldonoj de Kumeuaua kiuj okazos en 2013 en la angla (Usono), kroat-slovena kaj la ĉina
4. Tradukita al kataluna „Kolektanto de ĉielarkoj



Vikipedio:

Arno Lagrange: kun helpo de Z.Tišljar, E.Szekely kaj Đ. Dragojlović faris ampleksan artikolon en esperantlingva vikipedio kiu en oktobro estis proklamita: artikolo de la semajno.

Novartikoloj en Vikipedioj de Kroatio kaj Slovenio kaj pliampleksitaj artikoloj en vikipedioj: franca kaj angla. Verŝajnaj pliampleksigoj en kelkaj aliaj (entute ekzistas artikoloj en 29 lingvoj)

Ekspozicioj:

1. Libroj: Rotterdam, Spiška Sobota, Maribor, Zagreb (marto) , Hraščina, Berlin, dum Franca kongreso,
2. Maskoj, muzikinstrumentoj kaj chapoj: Senta (Serbio) 16.6.
3. Afisshoj: Subotica 20. Maj
4. Etnografia muzeo Zagreb , malfermita 19.12: Ekspozicio pri neeŭropaj kulturoj ene de kiu la centran lokon havas 70 objektoj donacitaj de Tibor Sekelj. La muzeo eldonis libron trilingvan dediĉitan al la ekspozicio.

Zlatko Tišljar

LA AGADO DE LA ESTRARO DE EEU EN JANUARO

La estraro de EEU okupiĝis dum fino de decembro kaj tuta januaro per administra, tamen tre grava laboro: verkado de novaj projektoj por diversaj konkursoj de EU kiuj havis la transdonlimdaton ĉefe en fino de januaro. La agadon gvidis (kaj la ĉefan laboron plenumis)

Maja Tišljar kaj partoprenis Petro Balaž kaj Zlatko Tišljar. Ili faris enorman laboron, elpensinte kaj prilaborinte 4 novajn projektojn en kiuj EEU estos aŭ projektkunordiganto de la agadoj (en la kazo de unu paŭŝalsisteme financata projekto) aŭ helpos pri la projekto, sed sen esti oficiala partnero ĉar vera partnereco ne eblus momente por EEU en kroma projekto granda projekto dum daŭros la aktuala projekto lingvo.info. La projektoj iris al EU kadre de la programoj de la programo por tutviva lernado (Comenius kaj Grundvig) kaj la programo Citizenship. Ĉiu el la projektpriskriboj ampleksas centon da paĝoj sen administraj partoj de la monpeto.

Ni nun devas atendi kelkajn monatojn por scii rezultojn: ĉu iu el la proponataj projektoj ricevos subtenon kaj estos suvenciata.

Zlatko Tišljar

PROFESIA SVISA TEATRO UMS 'n JIP FESTIS SIAN 5-JARIĜON PER DU SPEKTAKLOJ EN ESPERANTO

La 24-an de novembro 2012 19h30, Imprimerie Basel, Schleifferei (www.imprimerie-basel.ch) kaj la 29-an de novembro 2012 19h30, Imprimerie Basel, Schleifferei (www.imprimerie-basel.ch) estis prezentita en Svislando spektaklo (ĉambra opero elektropopa) pri Esperanto...

En la opero estas uzataj la germana kaj esperanta lingvoj kaj subtitoloj en la franca. <http://three.umsnjip.ch>



THREE estas post ONE (2008) kaj TWO (2009) la tria muzikteatraĵo de Svisa ensemblo UMS 'n JIP, kiu apartenas pro ĉirkaŭ 70 koncertoj jare al la plej aktivaj mondaj ensembloj de nova muziko. Ĝia plej nova albumo estas pledo por eŭropa »lingua franca« baze de Esperanto kiel rimedo por ekonomia suprensalto: unu anstataŭ 23 eŭopaj oficialaj lingvoj. Por UMS 'n JIP tio signifas : El Esperanto fari Eŭropeon –politike neŭralan lingvon kiu ne konkurencos kun naciaj lingvoj kaj kiu estos por eŭopanoj antaŭĉo facile lernebla. Ene de

delikataj ombroludoj kaj de fore direktata aŭto-ludilo, la plej fajnaj tonŝejoj kaj severe komponitaj scenoj oni sekvas uniformitan duopon tra lernejoj, politikaj diskutoj kaj Esperanto-kurso. Kompozicie la ĉambra opero moviĝas inter eksperimenta teĥno-muziko kaj teknikoj de moderna klasika muziko. Sekvas la tuton parolisto en Esperanto, blokflutoj kaj minimuma elektronika muziko. Minimuma estas ankaŭ la scenejo aranĝita de Simon Wunderlich por kiu sufiĉas tri flankaj vandoj kaj kvar reflektoroj kaj la scenarangĝo de Wolfgang Beuschel kreas belegan fabelan etoson.

Esperanto estas enkondukata efike, demokratie, ĝi donas egalrajtecon kaj interkulturan pontservon. En pli posta okazado malfermas la opero **THREE** novan dimension kaj oni komprenas: la verda ne estas nur la koloro de espero kaj kresko, ĝi estas ankaŭ la koloro de viziaca perspektivo: Esperanto.

UMS 'n JIP (Ulrike Mayer-Spohn/Javier Hagen) apartenas al la plej eksterordinaraj kaj tutmonde plej aktivaj grupoj de nuna tempo: post studoj en komponado, interpretado de nuntempa muziko kaj samtempe ankaŭ de audiodeseĝno en Nederlando, Germanio, Italio kaj en Svisio ili laboras ankaŭ kun voĉo, bekflutoj kaj elektronika muziko, virtuoze kaj majstre sur dislimo inter muzikala avangardo kaj pop-muziko, inter analogia kaj diĝita prezentiĝoj, inter koncertoj kaj muzika teatro same kiel inter eŭropa kaj esktereŭropa muzikoj. Ili estis gastoj de gravaj festivaloj por Nova Muziko de Eŭropo kaj de Ĉinio, kie kiel duoj kaj kiel solistoj ili realigis pli ol 150 verkojn en kunlaboro kun komponistoj kiel Heiner Goebbels, Wolfgang Rihm, Peter Eötvös, Aribert Reimann, Mauricio Kagel, Huang Ruo, Guo Wenjing, DeqingWen, Du Yun, Tao Yu, Hans-Ulrich Lehmann, Mischa Käser, Maria Porten, Beat Gysin, Xavier Dayer, Junghae Lee, Erik Oña kaj kun multaj aliaj.

Subtenu la teatron, kiu havas en sia repertuaro tiun gravan teatraĵon kiun vidis jam miloj da spektantoj. La teatristoj estus ĝojaj se oni invitus ilin al Esperantaj aranĝoj (kongresoj kaj simile). Jen ĉi-sube la adreso:

UMS 'n JIP
Swiss Contemporary Music Duo
Production Office
Post Office Box 317
CH-3900 Brig (Switzerland)
+41 76 5877413
info@umsnjip.ch
<http://umsnjip.ch>

LA 49-aj BALTIAJ ESPERANTO-TAGOJ (BET- 49)

Litova Esperanto-Asocio invitas Vin partopreni vicajn ĉiujarajn internaciajn somerajn tradiciajn Baltiajn Esperanto-Tagojn (BET- 49).



CELOJ kaj TASKOJ: studi problemojn de Esperanto-movado, elstarigi nuntempajn ĉefajn taskojn de Esperanto-agado, interŝanĝi sperton pri esperantista laboro, perfektigi en Esperanto, enhavoriĉe pasigi la tempon. BET okazas de 1959 ĉiujare laŭvice en Latvio, Estonio, Litovio.

LOKO: BET-49 okazos en orientlitovia urbo Utena, kiu estas fondita en 1261 kaj estas unu el la plej malnovaj loĝlokoj de Litovio. En la urbo loĝas 35000 loĝantoj, tra la urbo fluas kvar riveroj. La urbon de ĉiuj flankoj ĉirkaŭas lagoj, arbaroj kaj montetoj. En la teritorio de distrikto Utena estas 186 lagoj kaj lagetoj.

TEMPO: BET-49 okazos inter la 6-a kaj 14-a de julio 2013.

Antaŭ kaj post BET-49 estas ebleco laŭ moderaj prezoj aktive ripozi en proksimeco de Utena.

ALIĜO: por alighi necesas plenigi aliĝilon kaj sendi ĝin al Litova Esperanto-Asocio: p.k. 167, LT-44287 Kaunas, Litovio. Eblas alighi telefakse +370-37-228616 au rete al litova.ea@mail.lt.

PROGRAMO : tradicia, t.e. somera universitato, paroligaj kaj perfektigaj kursoj, literaturaj aranĝoj, muzikaj kaj artaj vesperoj, debatoj pri situacio kaj problemoj de Esperanto-movado en Baltiaj landoj, tradukista kurso, pedagogia seminario, seminario de klubestroj kaj aktivuloj, movada lernejo, sciencteknikaj kaj fakaj aranĝoj, instruado de kantoj, junularaj aranĝoj, konkursoj, kvizoj, distraj programeroj, ekskursoj tra la urbo kaj aliaj apudaj vidindaĵoj, diskutoj, forumoj, libroservo, interkona vespero, diservo, baza konatiĝo kun litova lingvo kaj kulturo, ekspozicioj, filmoj kaj lumbildoj, gazetara konferenco, sportaj ludoj, oficiala malfermo kaj fermo, adiaŭa vespero k.a. Aktualajn informojn pri BET-49 Vi povas trovi en retejo de Litova Esperanto-Asocio www.esperanto.lt.

ALIĜ-KONTAKTADRESO: p.k. 167, LT-44287 Kaunas, Litovio, Litova Esperanto-Asocio. Poshtelefonoj de LEA estas +370-687-12219 kaj +370-686-69875. Telefakso estas: +370-37-228616. Retadreso de LEA estas: litova.ea@mail.lt; pjedorovas@takas.lt kaj irenaa@takas.lt.

Povilas Jegorovas

KONFERENCO DE ILEI EN HERZBERG



Karaj legantoj, gekolegoj, junaj kaj eterne junaj interesiĝantoj pri intruado!

LKK de la 46-a ILEI-konferenco kore invitas vin al Herzberg-Sieber inter la 12 kaj 18a de julio por partopreni interesan fakan programon, prelegojn, metodikan trejnadon, fakkunsidojn, ekskursojn, variajn kulturajn ofertojn!

Ne forgesu, la plej favora aliĝperiodo finiĝos la 31-an de januaro. Por gejunuloj aparte malalta kotizo!

Bonvolu legi detalojn kaj rete aliĝi ĉe <http://ilei-konferenco.esperanto-urbo.de>.

Korajn salutojn nome de LKK
Zsofia Korody
vicprezidanto de ILEI
<http://esperanto-urbo.de>

IBERIA RENKONTIĜO (IRO) 2013

La renkontiĝo okazos inter la 15-a kaj 17-a de marto 2013 en Madrido (Junulargastejo San Fermin). Temas pri tradicia renkontiĝo de iberiaj E-movadoj kies ĉefa celo estas amuziĝi kaj koni interesajn homojn, ĉio per Esperanto.

	Vendredo		Sabato		Dimanĉo		
	Esperanta	Disvastiga	Esperanta	Disvastiga	Esperanta	Disvastiga	
10:00 - 11:00							
11:00 - 12:00			Libroservo	Kiel fari sian propran sapon	Kurso por komencantoj	Biciklado kaj manĝado	
12:00 - 13:00				Projekto San Fermin			
13:00 - 14:00							
14:00 - 15:00							
15:00 - 16:00							
16:00 - 17:00	Akceptado		Peĉakuĉo				
17:00 - 18:00			Dokumenta Filmo The universal language				
18:00 - 19:00			SAT kaj esperanto				
19:00 - 20:00			Prelego: Esperanto y cultura				
20:00 - 21:00		Interkona vespero		Gvidita vizito «Max Estrella tra Madrido: "Bohemia Nokto"»			
21:00 - 22:00							
22:00 - 23:00							
23:00 - 00:00			Nokta diboĉado en Madrido				

Informiĝu ĉe: <http://esperanto.es:8080/IberiaRenkontigho/komenco.do?l=eo&c=programo>

MONDA SOCIA FORUMO EN TUNISO

Esperanto estos reprezentata en la Monda Socia Forumo okazonta fine de marto en la ĉefurbo Tuniso, Tunizio! Estos tie esperantistino loĝanta en Tuniso kaj esperantisto el Maroko. Inter la proponataj agadoj estos prelego en la araba pri "Esperanto: la lingvo de la printempo en la mondo" [Vi komprenas, ke la araba printempo ludos grandan rolon dum tiu evento]. Nun niaj partoprenantoj estas pretigantaj la materialon en la araba, franca kaj angla por disdoni ĉe la budo de Esperanto.

La partoprenelspezoj estas pagataj grandparte de Esperanto Internacia, dum la Komisiono pri Meza Oriento kaj Norda Afriko de UEA kunordigas la tuton.

Ni havas ankoraŭ multon por elspezi kaj ni ŝatus kontribuon de tiuj, el vi, kiuj povas kaj volas helpi. Vi rajtas pagi per la kutimaj pagmanieroj al UEA, http://www.uea.org/alighoj/pag_manieroj.html, aŭ al la konto "arabio" de la Komisiono aŭ al

la konto "eint-o" de Esperanto Internacia. Ambaŭ kontoj estas ĉe UEA. Bonvolu indiki kiel celon de la pago la jenan: "por Tuniso".

Renato Corsetti

DENOVE INSTRUISTA TREJNSEMINARIO DUM LA KONGRESO DE ESPERANTO EN ITALIO

Simile al la pasinta jaro, dum la kongreso de Esperanto en Italio denove okazos interesa instruista trajnado, kun la gvido de Katalin Kovats. La 40-hora programo konsistos el teoria kaj praktika partoj, kadre de kiuj la partoprenantoj ekkonos - inter aliaj - modernajn alirojn al la lingvoinstruado, ellaboros utilajn planojn kaj programojn por sia laboro kaj spertos kelkajn konkretajn instrumentojn, inter ili sugestopedion kun Sylvain Lelarge kadre de mallonga, modelita kurso pri la franca lingvo.


La organizantoj de la seminario - Kosmo Strategio Ltd., esperantista entrepreno, kune kun Itala E-Federacio kaj edukado.net - kandidatiĝis ankaŭ ĉi-jare por ricevo de subvencioj. La limdato por aliĝo estas: la 16a de januaro.

Ni petas tiujn, kiuj interesiĝas pri peto de subvencio (loĝantoj en EU + Svislando, Norvegio, Islando, Kroatio kaj Turkio!) anoncu sin ĉe la redaktejo kaj samtempe kontaktu trejnado-kastelaro(ĉe)kosmo.eu.com por havi detalajn informojn kaj helpon pri la proceduroj.

Legu pli ĉe la paĝo: <http://edukado.net/novajhoj?id=302>

Francesco Maurelli

MALLONGA RAPORTO DE LA SUDEŬROPA KOMISIONO DE UEA PRI AGADOJ EN 2012



En Hispanujo la Hispana Esperanto-Federacio daŭrigis sian laboron por Esperanto, per la kutima informado, la okazigado de kursoj en la lokaj kaj regionaj asocioj, la publikigo de sia Bulteno. Komence de majo oni celebris la 71-an hispanan kongreson de Esperanto en la manĉa urbo Almagro, kun tre rimarkinda kultura kaj turisma programo. La kongreso bone eĥis en amaskomunikiloj, kio instigis HEF-estraron fortikigi tiun informan flankon per nomumo de specifa komisiito. La decido havis tujan sukceson per kampanjo ĉirkaŭ la datreveno de la lingvo, kun interalie ampleksa raporto la 26-an de julio mem, tagmeze kaj vespere, en la ĉefa televida novaĵprogramo de la lando, en la ŝtata stacio TVE. Ankaŭ okaze de la 125-a datreveno, HEF renovigis la ekspozicion pri la lingvo, kiu estis montrita interalie en centra kulturcentro de la ĉefurbo Madrido,

inaŭgurita per prelego de HEF-prezidanto.

En *Italujo* same kiel en Hispanujo la laboro antaŭeniris en 2012 laŭ la kutima ritmo. Rimarkinda estas la itala kongreso de Esperanto aranĝita en la urbo Mazaradelvalo, Sicilio, kie dum la tuta jaro okazis instruado de Esperanto al centoj da lernejanoj kun postaj ekzamenoj de la Itala Instituto de Esperanto. Danke al financa subteno de eŭropaj instancoj pluraj eksterlandaj volontuloj povis dum la jaro deĵori en la loka Centro pri Esperanto kaj Interkulturo, kaj instrui Esperanton per la rekta metodo. La Centro estis starigita de Itala Esperanto-Federacio danke al ricevo de apartamento disponigita de la urbodomo. Daŭris intertempe la tradiciaj retaj kursoj kaj informaj agadoj en aliaj partoj de la lando kaj la agado de la Itala Esperanto-Junularo.

En *Malto* intensigis sian laborn kun junula entuziasmo la loka pioniro kaj dumjardeka aganto Carmel Mallia. Li daŭre verkas en la malta por maltaj gazetoj kaj liaj artikoloj estas ĉiam aperigataj. Dum la jaro 2012 certe aperis ne malpli ol 10 artikoloj de li. Krome li aranĝis kampanjon por disdoni al ĉiuj bibliotekoj en Malto la broŝuron « Malkovru Esperanton » en la angla [La ekzempleroj estis donacitaj de Stano Marček kaj de la brita landa asocio]. Ĉirkaŭ tio li ankaŭ aranĝis libro-donacon al la ŝtata biblioteko. Plue, li estis intervjuita dum unu horo che unu el la maltaj radioj. Esperanto estis ankaŭ preparolata ĉe la ŝtata televido dum longa tempo de malta lingvisto dum lingva programo. Estis ankaŭ kontaktoj kun TEJO, kiu intencas lanĉi agadon en tiu insulo.

En *Grekujo* en la komenco de 2012 grekaj esperantistoj “konstruis” la retlokon de la asocio (www.esperanto.gr), kunligita kun kun fejsbuka paĝo kaj blogo. Krome ili kreis grupojn en fejsbukoj, greklingvan, por grekoj kaj esperantlingvan por fremdaj kaj grekaj amikoj. Ankaŭ, okaze de la 125jara datreveno de nia Esperanto, Kostas Kiriakos prezentis sian novan greklingvan libron kun la titolo “Internacia Lingvo Esperanto -1887-2012, 125 Jaroj – De la 19a ĝis la 21a Jarcento”. Temas pri 400paĝa alloga enhavo, pri aspekto belega, pri verko grava, kun riĉa materialo, freŝa, juneca, kun pli ol 1.000 koloraj fotoj. Dum la jaro estis senditaj 9 informbrosuroj al ĉiuj grandaj gazetoj, revuoj, radio- kaj televid-stacioj kun la plej interesaj informoj rilate al la tutmonda Esperanto-agado.

2012 estis interesa jaro por esperantismo en *Kipro*. Gxi povus esti priskribita kiel prepara jaro por 2013, jaro kiu siaflanke anoncas sin des pli grava por la eventuala eko de vera esperanta movado, finfine post tiom da klopodoj. Oni serĉis kontaktojn kun komunumoj kaj kulturaj institucioj de la lando, kio havis sufiĉe bonajn rezultojn. Ekzemple, la propono pri dedico de vojo al Esperanto aux al gxia kreinto Zamenhof, sendita al dekoj da urboj kaj vilagxoj, ja estas nun pridiskutata en pluraj komunumoj kaj oni atendas respondon en la venontaj monatoj, precipe en la cxefurbo Nikozio, kiu montris intereson cxi-rilate. Post rendevuoj kun estroj de lokaj publikaj kaj privataj lernejoj, oni sukcesis organizi ankaux senpagan kurson de Esperanto en la centro pri fremdaj lingvoj "Plurilingua" de Limasolo. Oni organizis parolon pri Esperanto ankaux en la privata mezlernejo "Sankta Maria" de Limasolo, unu el la plej malnovaj, konataj kaj prestigxaj de la insulo. Tio vekis la intereson de plure da gejunuloj, kiuj jam eklernis Esperanton pere de la retejo Lernu aux aligxis la senpagan kurson de "Plurilingua". a jaro finigxis per la konstato, ke estas tempo oficiale malfermi E-asocion en Kipro.

Renato Corsetti

ALIĜU AL INTERNACIA JUNULARA FESTIVALO EN OSTUNI (BR), ITALIO

La Tradicia IJF okazos inter la 27a de marto kaj la 2a de aprilo 2013

La unua aliĝperiodo por la Internacia Junulara Festivalo 2013 estas plilongigita ĝis la 21-a de januaro. Kiu ankoraŭ ne faris, ne maltrafu la okazon por aliĝi je la plej malalta kosto!

http://iej.esperanto.it/ijf/2013/?page_id=15&lang=eo

TEJO-aktuale

EL LA HISTORIO: Bronisław Geremek kaj Esperanto



Bronisław Geremek estis grava pola politikisto kaj en la pinto de sia politika kariero li estis vicprezidanto de Eŭropa Parlamento. Li lernis Esperanton en sia juneco, ia. kiel skolto kaj poste studento de Varsovia Universitato. En januaro 2008 li akceptis reprezentantojn de EEU, la diplomatojn D-ron Seán Ó Riain kaj Jozef Reinvar, okaze de ekspozicio pri Esperanto en la brusela parlamentejo organizita fare de Ljudmila Novak, MEP, el Slovenio (nun ŝi estas ministrino en slovena registaro). Profesoro Geremek kiel Vicprezidanto de Eŭropa Parlamento konsentis kun ili kunorganizi neformalan diskuton en la Eŭropa Parlamento pri la temo "Esperanto: amiko aŭ malamiko de plurlingveco?" por

ĉeestigi Esperanton en la politika areno de la Eŭropa Parlamento, kaj poste starigi interpartian grupon de deputitoj favoraj al propedeŭtika rolo por Esperanto en la plibonigado de lingvolernado ĝenerale. La debato okazis la 14-an de julio, tuj post la tragika morto de profesoro Geremek (li akcidente mortis ĝuste dum la veturo de Pollando al la debato en Bruselo), tamen en la debato ĉeestis 27 homoj, multaj el ili EP-anoj, sed bedaŭrinde sen la iniciatinto de la debato.

Edward Kozyra

Oficiala organo de Eŭropa Esperanto-Unio.

Finredaktita: la 31-an de januaro 2013

Redaktoro: Zlatko Tišljár

En la numero kunlaboris: Jukka Pietiläinen, Zlatko Tišljár, Povilas Jegorovas, Zsafia Korody, Renato Corsetti, Francesco Maurelli, Edward Kozyra.

Kontakto: ztisljar@gmail.com

Retpaĝo: <http://www.europo.eu/eo/euhropa-bulteno>

